

Germana Esperantisto

Der Deutsche Esperantist

Oficiala Organo de
Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.)
kaj de aliaj esperantistaj unuiĝoj

Aperas duonmonate en du alternantaj eldonoj:
Eldono A (Propagando) — Eldono B (Literaturo)



Offizielles Organ des
Deutschen Esperanto-Bundes E. V.
und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Erscheint halbmonatlich in zwei abwechselnden Ausgaben:
Ausgabe A (Propaganda) — Ausgabe B (Literatur)

Abonprezo: por jaro 2.400 Sm. (Provahono por duonjaro, komen-
ciĝanta en Januaro kaj Julio, 1.200 Sm.). Ĉiu eldono aparte:
1.200 Sm. (0.600 Sm.). Anoncoj: Vidu tarifon sur la kovrilo

Bezugspreis: für ein Jahr 4.80 M (Probeabonnement für ein Halb-
jahr, beginnend im Januar und Juli, 2.40 M). Jede Ausgabe ein-
zeln: 2.40 M (1.20 M). Anzeigen: Siehe Tarif auf dem Umschlag

Redaktoro: Friedrich Ellersiek, Berlin S 59, Wissmannstr. 46

Alsenditajn artikolojn la redakcio laŭ bezono korektas. Nepresitajn manuskriptojn ni redonas nur, se oni aldonis poŝtmarkon por la resendo

11^a Jaro No. 6 B

Eldonejo kaj Redakcio: Dresden-A. 1, Struvestr. 40

Junio 1914

Pri nia karavano al la Deko

De multaj flankoj ni jam ricevis aliĝpromesojn, kiuj pruvas al ni, ke la aranĝo de la karavano estis bona ideo. Sed ĝis nun nur la plej malmultaj el la promesintoj pagis la monon por la aliĝo. Ni denove atentigas pri tio, ke ni povas konsideri kiel partoprenantojn nur tiujn personojn, kiuj pagis la kotizon por la karavano al nia banko en Berlin (vidu G. E. 5 B, pĝ. 73, aŭ la apartan represon aldonitan al No 5 A). Do, kiu unue venas, ties dezirojn pri loĝado ni povas plej bone plenumi. Poste, kelkajn tagojn antaŭ la fino de la aliĝakcepto, estas tre malfacile, se ne eĉ maleble, kontentigi ĉiujn dezirojn.

Plue, respondante kelkajn demandojn, ni speciale atentigas ankoraŭfoje pri tio, ke por la sumo al ni pagita ni senpage liveros al niaj karavananoj ĉiujn gvidadojn kaj ekskursojn. Inter la lastaj estas ankaŭ tiu al Versailles, kiun ni, dank' al la komplezo de la Organiza Komitato, povos fari kune kun la granda ekskurso de la kongreso. Sekve la kongresanoj, kiuj apartenas al nia karavano, ne bezonas pagi al la kongresa komitato la apartajn kotizojn, de ĝi postulatitajn por tiu ĉi ekskurso kaj por gvidadoj. Nia karavano faros la ekskurson al Versailles en specialaj veturiloj.

Neenkalkulitaj en la karavanaj prezoj estas la kotizoj por la kongreskarto kaj por la teatra bileto (Georgo Dandin).

Germana Esperanto-Asocio
Germana Esperantisto

Paris

la urbo de la Deko

Ĉu niaj legantoj, el kiuj multaj jam aliĝis la kongreson, ne ŝatos legi kelkajn paĝojn pri la mond-fama ĉefurbo de Francujo, la aliĝintoj por antaŭviziti la urbon, kiun ili poste plej plezure trakuros, la aliaj por tamen ekkonatiĝi, almenaŭ pense, kun tiu tutmonda centro, la nunjara revo de niaj samideanoj? Tion pripensinte ni petis de S-ro Marcel Générmont, Parisa arĥitekto kaj beletristo, komitatano de la Asocio „Amikaro de Paris“ kaj sekretario de la komisiono por la Gazetaro ĉe la Xa, ke li bonvolu, speciale por ili, verki artikolon pri tiu demando, kiun li jam ofte pritraktis. „La sekvantaj linioj“, li skribas al ni, „ne celas starigi gvidlibron de Paris — tiu eldonita de la Loka Komitato kaj la nacilingvaj gvidiloj plene sufiĉos —, sed nur skizi diversajn aspektojn de la ĉefurbo kaj prezenti serieton de impresoj rilataj al la Parisa vivado.“

La kliŝaĵoj, kiuj ilustras la artikolon de S-ro Générmont, estas speciale faritaj por G. E. kaj afable pruntedonitaj de *Les Amis de Paris* (La Amikaro de Paris). Tiu asocio, kies sidejo estas 167, Rue Montmartre, Paris, celas „diskonigi Paris'on eksterlande, faciligi al la fremdlandanoj la viziton de Paris kaj pliagrabli ilian restadon“. (Jara kotizo 7 frankoj.) *Les Amis de Paris* (Esp. E. de U. E. A.) publikigas ĉiumonate artan revuon senpage sendatan al la membroj; korespondantojn ĝi serĉas en Germanujo. Nia kunlaboranto laŭpete sendos detalojn al interesatuloj.

La Redakcio

Iom da historio

Se ankaŭ la deveno de Paris ne perdiĝas en la punkto de l' tempoj, oni tamen estas devigata trarigardi multajn kaj multajn paĝojn de la historio kaj malantaŭeniri ĝis la unuaj tagoj de nia epoko, por ĝin retrovi. Paris ja estas unu el la plej maljunaj urboj de l' civilizita Eŭropo. Julius

Cæsar, la unua, parolis pri la dirita urbo, kiun li nomis *Lutetia* (el *luth*, akvo; *thouéze*, mezo; *y*, ejo, diras la etimologiistoj) kaj pri ĝiaj loĝantoj, la *Parisii*. En tiu jaro, la 53a antaŭ J. K., kuniĝis en Lutetia, kunvokitaj de J. Cæsar, la ambasadoroj kaj delegitoj de la venkitaj gentoj; sekvantan jaron Parisanoj, kiuj ne akceptis la pacon kaj ree deziris starigi la sendependecon de sia nacio, denove estis venkataj de la roma generalo kaj devis definitive submetiĝi. Tiam la limoj de la urbo estis tiuj de la *Cité* (la Civito), sed ili baldaŭ etendiĝis, surkovrante parton de la maldekstra bordo de la Seine, kie imperiestro Constantius Chlorus konstruigis gravan kastelon, kies restojn oni hodiaŭ nomas la „Terma Palaco“.

Ĉirkaŭ la jaro 250a Lutetia estis episkopejo, kaj ĝi iom post iom perdis sian unuan nomon, por akcepti tiun de la popolo mem: ekaperis la termino de *Paris*, kiun ĝi poste neniam plu forlasis.

En 497 la frankoj perforte malfermis ĝiajn pordojn, kaj ilia ĉefo Clovis loĝis en la Terma Palaco. La 27an de Novembro 511 li mortis, post nelonge sekvata en la tombon de Sanktulino Geneviève, patronino de Paris.

Kun Karlo la Granda Paris iom malkreskis pro la translokado de la ĉefurbaj servoj al Aachen; poste venis la invadoj, precipe tiu de la Normandianoj, kiuj 30000-ope sieĝis la civiton dum 13 monatoj, sed vane, dank' al la kuraĝa defendo de la grafo Eudes kaj de la episkopo Gozlin. „Per tiu heroa sieĝo — skribas la historiisto H. Martin —, Paris inaŭguris siajn altajn fatojn. De tiam ĝi reale fariĝis kapo kaj koro de Francujo.“

La unuaj Parisanoj


Venis poste la unuaj reĝoj „Capétiens“, sed neniu grava ŝanĝo estis farata ĝis la reĝado de Filipo-Aŭgusto. Kun tiu princo, male, starigis multaj konstruaĵoj: preĝejoj kiel *Notre-Dame*, monaĥejoj, kolegioj, gimnazioj, hospitaloj; konstruiĝis

la 3a remparzono de Paris, ankoraŭ nomata „remparzono de Filipo-Aŭgusto“ (1190 — 1220), kaj kelkaj stratoj de la urbo estis pavimataj. Ĉirkaŭ la jaro 1204 la sama reĝo metis la fundamenton de la palaco *Louvre*, kiun Karlo la Va kompletigis kaj plibeligis. De tiu epoko ankaŭ datumas la kreado de la urbaj lernejoj, kiuj kunigis ĝis 20 000 lernantojn, kaj tiu de la Universitato Parisa.

Dum la XIVa jar-

cento estis samtempe tri urboj en la granda: la *Civito*, koro, el kiu poste disradiis ĉiuj fortoj; la *Universitato*, sur la maldekstra riverbordo de la Seine, kaj la propredirita *Urbo*, grupita ĉirkaŭ la *Hotel-de-Ville*. Karlo Va konstruigis la *Bastille*, unue fortikaĵo por la defendo de Paris kaj poste politika mal-

liberejo; ĝi ludis en la historio la rolon, kiun ĉiu konas. Sub la regado de Francisko Ia, gravaj laboroj ŝanĝis la aspekton de Paris: nova urbdomo estis kreata kaj *Le Louvre*, parte detruita, ree aperis, tiam en la renesanca stilo. En 1594 Henriko IVa, kies jenaj vortoj estas famaj: „Paris ja valoras meson“, konvertiĝis kaj eniris sian novan ĉefurbon, kiun li senĉese pligrandigis, plibeligan-



Paris: La Urbdomo (*Hotel-de-Ville*)

Kl. „Amis de Paris“



Paris: Triumfarko de „l'Etoile“

Kl. „Amis de Paris“

te la *Louvre* kaj *Tuileries*, la *Place Dauphine*, transformante la Civiton, finigante la Ponton Novan (*le Pont-Neuf*, kie nun staras lia statuo), kaj kreante la *Samaritaine*, unua maŝino por disdoni la akvojn en la stratoj de l' urbo.

De nun ĉiutage kreskis en la mondo la reputacio de Paris kaj de ĝiaj feliĉaj loĝantoj: „Prenu — skribas V. Hugo en sia antaŭparolo de *Paris* —, la sinsekvajn planojn de Paris je ĝiaj diversaj aĝoj. Ilin surmetu, unu sur la alian, kun Notre-Dame kiel komuna centro. Mireginde


montriĝas la pligrandiĝado. Ŝajnas, ke vi vidas, ĉe la ekstremaĵo de lorno, la pligrandiĝantan alproksimiĝon de astro.“ Efektive de tago al tago multobligis la posedaĵoj de la Luma Urbo: kun Ludovikola XIIIa, L. XIVa, L. XVa, L. XVIa estis konstruataj *le Palais Royal* (Reĝa Palaco), *l'Institut*, *les Invalides*, *l'Observatoire*, *les Gobelins* ktp. Same la reĝoj konstruigis trans la riveron novajn pontojn, taŭge aranĝis la placojn

Vendôme, *des Victoires* kaj *du Caroussel*, malfermigis la grandajn pordojn *St. Martin* kaj *St. Denis* kaj triumfajn arkojn (*Trône*, *St. Antoine*).

Dum la franca revolucio multe suferis la ĉefurbo pro la ĝenerala detruado, kiu ĉie

renversis la domojn, forbruligis la monumentojn: la *Bastille* estis detruata; falis partoj de la malnovaj palacoj aŭ preĝejoj. Sed la alveno de *Napoleon I*a dotis Paris'on je la kolono *Vendôme*, je la triumfarko de *l'Etoile*, je la *Bourse*, je la novaj pontoj *Iéna*, *des Arts*, je la *Cité*, *Austerlitz*. . . Pasis la sangaj tagoj de 1830 kaj 1848, poste tiuj de 1870—1871; kun la paco la IIIa Respubliko oferdonis

al sia ĉefurbo la plej urgajn reformojn kaj multajn plibeligojn: finado de *l'Opéra*, konstruado de la *Trocadéro*, de la preĝejo *Sacré-Coeur de Montmartre*, de la ponto *Alexandre III*, de la 2 palacoj *des Champs-Élysées*, de la *Sorbonne*, pligrandiĝo de la stacidomo *St. Lazare*, *Opéra-Comique*, *Palais de Justice*, *Bourse*, *Louvre* k. a. . .



Paris: Le Petit Palais (Champs-Élysées)

Kl. „Amis de Paris“



Paris: Pordego St. Martin. La Bulvaroj

Kl. „Amis de Paris“

La nunaj Parisanoj

En tiu nova urbo, ĉiutage plibeligata, ĉiujare pliagrabiligata per la novaj aranĝoj de ĝiaj avenuoj kaj promenadoj, per la multobligado de ĝiaj veturiloj kaj tramvojoj, per senĉesaj klopodoj por higieno kaj beleco, vivas tiu tipo de la franca

karaktero, tute aparta, tute speciale edukita, samtempe pli laborema kaj pli ĝojema, sprita inter ĉiuj, frivola aŭ kuraga laŭbezono . . . *le Parisien* . . . Malbone kaj neĝuste konataj de la nefrancoj estas la ĉefaj karakteroj de tiu nedifinebla tipo, kaj por ĝin bone ekkoni, multaj preferas veni Paris'on, por ĝin detale kaj en ĝia mezo mem studi. Esence la Parisano estas mokema: li

facile ridas pri novaĵo, kiun li ne konas, sed same facile li aprobas novan ideon, kiam li estas ekkoninta ĝian grandecon kaj ĝian oportunecon. Ofte neinformitaj Parisanoj ridis pri la esperantistoj. Kiam en Aŭgusto ili estos vidintaj ilian seriozecon, la samaj certe konvinkigos pri la grava rolo de nia movado.

Jen kial la Organiza Komitato varme rekomendas, ke la kongresanoj, dum sia restado en Paris, metode propagandu, ne bruante aŭ montrante strangajn verdkolorajn kostumojn aŭ diversmode-lajn insignojn, kiuj donus al la mokemo de la Parisanoj tro facilajn okazojn. Sed gravan rolon por la propagando ili devos tamen ludi, parolante ĉie Esperanton, ĝin

uzante tute nature en la magazenoj, kaj tiamaniere la Xa Kongreso postlasos la plej daŭran kaj la plej utilan impreson en Paris.

Paris, franca ĉefurbo

Paris estas la unua urbo de Francujo pro la nombro de siaj loĝantoj. En 1800 ĝi kalkulis

547756 loĝantojn, nun ĝi havas tri milionojn. Se estus aneksataj la ĉirkaŭurboj, certe la enloĝantaro — kiu nuntempe estas la plej densa el ĉiuj eŭropaj urboj —, pli ol duobligus. Ne estas urbestro de Paris, kiel en aliaj ĉefurboj, sed *Prefekto de la Seine*, por la ĝenerala administrado, kaj *Prefekto de Polico*, por la policaj servoj. Plue Paris estas dividita en 20 arondismentojn; je la centro de ĉiu estas unu urbestro kaj 3 aŭ 5 vicurbestroj.

Kelkaj ciferoj eble donos taŭgan ideon pri la graveco de Paris. Ĝi posedas 2345 stratojn, 82 bulvarojn, 115 avenuojn, 166 placojn, 42 kajojn, 31 pontojn kaj proksimume 90000 domojn. La avenuoj, kun siaj 87000 arboj kaj 8103 benkoj, etendiĝas sur 270 kilometroj. Tri mil elektraĵoj kaj 53000 gasaj lampoj lumigas nokte la Lum-Urbon. Rilate al la diversspecaj veturiloj oni kalkulas 15000 ĉevalfiakrojn kaj 6000 aŭtofiakrojn, nomitaj „taxiautos“, kiuj transportas 30000000 da vojaĝantoj, 2500 tramveturilojn kun ĉiujare 300000000 da pasaĝeroj, 160000 biciklojn, 70000 privatajn veturilojn kaj fine subteran fervojon kun 150000000 da vojaĝantoj.

Paris enhavas pli ol 2000 firmaojn por financaj aferoj, 30000 kafejojn aŭ restoraciojn, 24500 komercejojn rilatajn al la nutrado, 3200 por la loĝado, 9500 por la vestado kaj tualetoj.

Fine la industrio havas 75000 firmaojn, 43000 oficistojn kaj 500000 gelaboristojn.

La bulvaroj kaj teatroj

La Parisaj bulvaroj estas mondfamaj, eble ne ĉiuj el ili, sed precipe tiuj ĝenerale nomataj france „les grands boulevards“, kiuj etendiĝas de la Place de la République ĝis la Madeleine. Forirante el la *Place de la République*,

kie alte staras la monumento al la Respubliko, ĉefverko de Morice, kaj tute proksime la Laborborso, oni sinsekve trapasas la B. *St. Martin*, (teatroj de la *Porte St. Martin*, *Ambigu* kaj *Renaissance*), la B. *St. Denis*, post la triumfa pordego *St. Martin*, kaj la B. *Bonne-Nouvelle* post la pordego *St. Denis*; la B. *Poissonnière*, (kun la granda konstruaĵo okupita de la ĉiutaga gazeto *Le Matin*), la B. *Montmartre* (teatro *Variétés*, kinematogr. *Pathé*), la B. *des Italiens* (granda hotelo de la *Crédit Lyonnais*, kaj tute proksime *l'Opéra-Comique*, la oficejo de la gazeto *Le Temps*), la B. *des Capucines* (teatro *du Vaudeville*, nacia teatro de *l'Opéra*) kun, meze, la placo de *l'Opéra*, kie komenciĝas la du



Paris: Place de la Concorde; funde la Madeleine

Kl. „Amis de Paris“

plej belaj stratoj de la Parisa centro: *l'avenue de l'Opéra* ĝis *Le Louvre*, kaj la *Rue de la Paix* ĝis la kolono Vendôme; fine la B. *de la Madeleine* kun la samnoma preĝejo, unu el la plej luksaj de Paris. La aliaj ĉefaj teatroj, kiuj ne kuŝas sur tiu triumfa vojo, estas la *Comédie-Française* (apud Louvre kaj Palais-Royal), *l'Odéon* (en la Latina Kvartalo) kaj la multaj scenejoj kaj aliaj spektaklejoj de Montmartre.

Preĝejoj kaj Muzeoj

Paris posedas 70 katolikajn preĝejojn, ne kalkulante la multnombrajn kapelojn, privatajn aŭ ne. Por havi precizan ideon pri la riĉeco kaj diverseco de tiaj konstruaĵoj, el kiuj kelkaj estas veraj ĉefverkoj de la franca arkitekt-



Paris: La Eiffel-turo

Kl. „Amis de Paris“

arto, necese estas viziti: *Notre-Dame* (mezepokaj skulptaĵoj; trezoro: vitraĵoj...), *St. Chapelle* (mirindaj vitraĵoj), *St. Etienne-du-Mont* (jubeo, tombejo de St. Geneviève), *St. Germain-des-Prés* (la plej malnova, skulptaĵoj de Girardon, G. Coustou...), la *Madeleine* (modernaj pentraĵoj) *St. Sulpice* (surmuraj pentraĵoj), *Val-de-Grâce* (freskoj), *N. D. des Victoires* (pilgrimcelo, ĉiuspecaj memoraĵoj), la *Sorbonne*

(tombejo de Richelieu), la *Trinité* (modernaj pentraĵoj), *St. Vincent-de-Paul* (freskoj de H.Flandrin) ktp. . . Plie Paris posedas proksimume dek-kvinon da protestantaj preĝejoj (tute speciale vidinda estas *l'Oratoire*, malnova kapelo de la Congrégation de l'Oratoire; ĝi datumas el la XVII jarcento kaj nur de 1811 estas dediĉita al la reformita kulto) — 1 rusan preĝejon, 1 grekan kaj 4 izraelidajn templojn.

La muzeoj de Paris — proksimume 20 aŭ 25 —, estas mondfamaj, sed, inter ili, la vizitantoj neniam forgesos doni specialan atenton al *M. du Louvre*, (antikvaĵoj, pentraĵoj de ĉiuj nacioj, ĉiuj artistoj kaj ĉiuj jarcentoj; skulptaĵoj kaj diversaj artaĵoj), *M. du Luxembourg* (moderna pentrarto), *M. de Cluny* (mezepokaj objektoj), *M. Carnavalet* (historia muzeo de la urbo), *M. des Gobelins* (tapiŝoj), *M. du Trocadéro* (komparita skulptarto).

La Latina Kvartalo

Estas unu el la plej kuriozaj kvartaloj de la ĉefurbo, tiel nomita pro la multnombraj lernejoj, liceoj, kolegioj, superaj institutoj kaj aliaj centroj de latina kulturo. *La Sorbonne*, kiu reĝas sur la Latina Kvartalo kaj estas kvazaŭ la ĉefurbo de tiu mondeto, surkovras 20 000 kvm. Ĝi estis fondata en 1253 de Robert de Sorbon, pastro de St. Ludoviko, franca reĝo, sed tute rekonstruita de 1885 ĝis 1900 laŭ la planoj de Nénot. Ĝi estas la sidejo de la vicrektoro de la Parisa Akademio kaj enhavas 29 katedrojn por la beletristika fakultato kaj 25 por la scienca; ĝi plue enhavas la praktikan lernejon de la superaj studoj, la lernejon des Chartes kaj la bibliotekon de la universitato (200 000 vol.). Fine la Sorbonne estas la kunvenejo de la Grupo Esperantista de Paris. En la sama kvartalo kuŝas la fakultato por leĝoscienco, fakultato por medicino, lernejoj de la dekoraciaj artoj, de l' belartoj, de la minoj, de farmacio, de politikaj sciencoj kaj aliaj. Du grandaj bulvaroj, *St. Germain* kaj *St. Michel*, estas la gravaj arterioj de la kvartalo, senĉese trapasataj, tage de lernantoj aŭ studentoj rapidantaj al la kursoj, kaj nokte de la samaj junuloj, akompanataj de siaj amikinoj, iom bruantaj kaj pitoreske vivigantaj la trotuarajn trinkejojn de la kafejoj. Estas tre kurioza spektaklo, tute mal-simila de la aliaj kaj pro tio speciale vidinda.

Paris pitoreska

Al la amatoroj de pitoreskaj aspektoj kaj al tiuj, kiuj ŝatas vidi ion alian, krom la ordinara Paris de la muzeoj, de la teatroj aŭ de la komunaj stratoj, rekomendinda estas iuj spektakloj, tute apartaj kaj donontaj tre precizan ideon pri moroj kaj kutimoj specialaj al la franca ĉefurbo kaj kiuj kaŭzas ĝian originalecon kaj kuriozecon.

Promenado estas deviga, mi diris, tra la Latina Kvartalo, proksimume je la 8a aŭ 11a

matene, por vidi la en- aŭ eliradon ĉe la lernejoj; je la 9a vespere, por ĝui la noktan amuzadon de tage laborema junularo, kiu senhonte kaj senĝene amuziĝas; alia tre pitoreska vizito estas farota al la grandaj bulvaroj inter la 5a kaj 7a vespere aŭ post la fermo de la teatroj, meznokte. Oni tre ĝuste diris, ke la bulvaroj estas la animo mem de Paris, elegantaj je iuj horoj, popolemaj dum aliaj, bruemaj dum la voĉdonaj tagoj, emociplenaj okaze de gravaj manifestacioj, kelkfoje tragediaj. . . . Sed ĉiutage, dum la kutima vivo, ili certe prezentas la plej neatenditan spektaklon kaj la plej ĉarman promenadon. Precipe dum la vespero tiu vigleco fariĝas pli videbla kaj pli nerva. Dum la laboraj kvartaloj ekripozas, la bulvaroj heliĝas je mil fajroj: fulmaj lumoj de la elektraj lampoj kaj orbrilaj radioj de la gaso, moviĝantaj lumetoj de la fiakroj, multkoloraj montraĵoj kaj magazenafiŝoj. Sentede la rigardo trakuras tiun radian riveron, vera muzeo de la nuntempa lukso.

Ankoraŭ vere tipaj estas: la strato Montmartre je la 6a vespere, kiam la vendistoj centope atendas la finpresadon de la vesperaj gazetoj, kiujn ili poste disvendos sur la bulvaroj, febre kriante la titolojn: „La Presse, La Liberté, lasta eldono, ĉiuj detaloj, sensaciaj konfesoj . . .“; la strato de la Paix, je la 5a, kiam la plej famaj riĉulinoj, reĝinoj de la modo, princinoj de la Parisaj salonoj, venas al la unuaj tajloroj aŭ al la grandaj juvelistoj; Montmartre, nokte, kun siaj trinkejoj kaj kantejoj . . . ; ankoraŭ la kvartalo de la *Halles*, sed je tre frua horo, je la 2a aŭ 3a matene, kiam alvenas cent kaj cent veturilegoj alportantaj al la ĉefurbo fruktojn, legomojn kaj ĉiuspecajn manĝaĵojn senditajn de la proksimaj urboj. Sed tiu lasta vidaĵo, tute pitoreska, ne estas priskribebla: kuraĝuloj kaj fruemuloj ŝatos ĝin vidi per siaj okuloj mem.


Al Paris

Kaj tiel, je kia ajn horo, en kiu ajn kvartalo, Paris prezentas al la fremdulo tute neatenditajn surprizojn kaj plej pitoreskajn vidaĵojn. „Kia ensorĉo! Kia adorinda urbo!“ ekkrias Rodin, la fama artisto. „Ĝi delogas kaj ĝi ebrigas! Oni ne povas ĝin ami modere. Oni ĝin ŝatas kiel amegatan kaj protektantan patrinon.“ Ĝiaj malnovaj konstruaĵoj estas akceptemaj kaj ĉarmplenaj. Ili havas diversajn stilojn laŭ la aspiroj de la jarcentoj, kiuj ilin starigis, sed ĉiuj similas per iu afableco kaj radia bonveneco. Paris instruas al ni la gracion, la liberan bonvenon, la elegantecon kaj ĉiujn virtojn, kiuj igas nian vivon vivinda.

„Bonvenon al Eŭropo!“ Kun la samaj vortoj, kiujn, en 1867, okaze de la Universala Ekspozicio de Paris, Victor Hugo adresis al la nacioj kunvokitaj por tiu tutmonda festego, ni salutas la de ni invititajn samideanojn, aŭ pli ĝuste, per

nova ekkrio: „Bonvenon al tuta homaro!“. Kaj kun la fama verkisto ni aldonas: „Ĝi eniru sian hejmurbon. Ĝi ekposedu tiun Paris'on kiu al ĝi apartenas kaj al kiu ĝi apartenas! Ĝi senĝene venu kaj plenpulme spiru en tiu urbo de ĉiuj kaj por ĉiuj, kie estis starigitaj, debatitaj kaj por liberigo solvitaj ĉiuj gravaj demandoj de nia epoko: individuaj rajtoj, bazo kaj deveno de la sociaj leĝoj, laborrajto, virinrajto, infanrajto, abolicio de l' nescio, abolicio de l' mizero, abolicio de ĉiufarmaj glavoj, netuŝebleco de la homa vivo. . .“ Kaj ankoraŭ uzante la terminojn mem de nia granda *Victor Hugo*, tiu tuthomara genio, tiu vera praesperantisto, la Parisa esperantistaro kunvokas siajn samideanojn por la paca laboro de nia Deko, festo de frateco kaj de unueco: „Urboj estas ŝtonaj biblioj. Ne estas en tiu ĉi iu kupolo, iu pavimo, kiu ne ion diras por la unueco aŭ ne donas iun lecionon, iun ekzemplon, iun konsilon. Venu la popoloj en tiun mirindan alfabeton de monumentoj, de tomboj kaj de trofeoj por eksilabi la pacon kaj mallerni la malamon! Ili konfidu: Paris jam faris siajn pruvojn, kaj decidajn!“

Marcel Gènermont



La unua monumento de Esperanto en Franzensbad

La unua monumento de Esperanto

Okaze de la nunjara tutaŭstria Esperanto-kongreso, kiu dum Pentekosto estis en la kuracurbo *Franzensbad* (Bohemujo) kaj pri kiu ni raportos en la venonta A-numero, oni inaŭguris la unuan Esperanto-monumenton. Nia bildo montras la belan monumenton, kiu povis esti starigata

dank' al la kuraĝaj kaj senlacaj klopodoj de nia samideano *Jakob Hechtl* el *Franzensbad*.

Unue *Dro Zamenhof* — same kiel ankaŭ multaj aliaj esperantistoj — ne konsentis pri la starigo de la monumento; sed *S-ro Hechtl* estis tiel fervora en la propagando por la realigo de sia ideo, ke li venkis la kontraŭdirojn kaj fine sukcesis efektiviĝi sian planon, eĉ ne timante proprajn monoferojn. Pro tiu ĉi persisto li meritas la plenan respekton de la tuta esperantistaro kaj la specialan dankon de tiuj el nia anaro, kiuj de la unua momento entuziasme konsentis pri la ideo. Dankon meritas ankaŭ tiuj, kiuj per siaj mondonacoj ebligis la starigon de la monumento; el la tuta mondo *S-ro Hechtl* ricevis „monbrikojn“ por ĝia konstruo.

La monumento sin prezentas kiel ses metrojn alta konstruaĵo kun ronde-angulaj konturoj, kaj ĝia konstrua materialo konsistas el bavara muŝelkalko (konk-hava kalkŝtono). Ĝi bazas sur masiva, kvinflanka piedestalo, kaj la supra parto montras terglobon, kiun ĉirkaŭstaras kaj apogas kvin alegoriaj virinfiguroj, reprezentantaj la kvin kontinentojn. Ĉi tiuj figuroj tenas en siaj manoj

girlandon de foliarajo, kiel simbolon de la Esperanta ideo. Super la reliefa portreto de nia Majstro, kiu troviĝas sur la antaŭa flanko de la piedestalo, brilas la kvinpinta stelo, farita el verdigita bronzo. Sub la reliefa bildo staras la vortoj „*Dro Zamenhof*, aŭtoro de Esperanto“ kaj „*Per Esperanto al Paco, Harmonio, Laboro kaj Dio!*“ La posta flanko de la solida kolono

montras la nomojn de tiuj, kiuj distingiĝis per aparte altaj mondonacoj kaj per alia subteno de la entrepreno. Inter ili troviĝas en unuaj vicoj la iniciinto de la monumento, S-ro Hechtl, kaj la urbo *Franzensbad*, kiu senpage donis la lokon por la konstruaĵo, donacis sufiĉe altan monsumon kaj prenis sur sin la konservadon de la monumento. La starigo de la monumento okazis en tri monatoj laŭ la plano kaj modelo de la skulptisto *Karl Wilfert juna* el Eger.

La inaŭguro de l' monumento, kiun partoprenis ankaŭ reprezentantoj de oficistaroj, estis tre solena. S-ro Hechtl faris la festparoladon, kaj kiam la kovraĵo falis, la banorkestro ludis la Esperantan himnon. Poste parolis urbestro *Loimann*, kiu transprenis la monumenton en la protektadon de la urbo *Franzensbad*, kaj la reprezentantoj de Esperantaj grupoj kaj unuiĝoj, kiuj metis florkronojn al la piedo de l' monumento. Fine la kantista unuiĝo „*Liederkrantz*“ kantis festhimnon, kaj la „*Falkensteiner Quartett*“ prezentis Esperantan kanton. Post la soleno la kongresanoj kuniĝis ĉe festeno en „*Kurhaus*“. Vespere okazis parkfesto kun iluminado de la monumento kaj de l' „*Kurpark*“, en kiu la unua ekkonilo de Esperanto staras en bela, tute konvena loko.

De la monumento ekzistas du belaj bildpoŝtkartoj, kiuj estas haveblaj ĉe S-ro Jakob Hechtl, fervoja sekretario en *Franzensbad* (Bohemujo), Hotel *Biedermaier*. Tria poŝtkarto montras la portreton de la iniciatoro.

Piloto

La ora arbo

de *Rudolf Baumbach* (Baŭmbah) [1005]

La ĉambro, en kiu komenciĝas nia historio, aspektis tre malluksa.

Apud kalke blankigitaj muroj, kies sola ornamajo estis kelkaj flaviĝintaj landkartoj, staris du mallarĝaj litoj, librobreto kaj vestoŝranko, sur kiu troviĝis globuso. La mezon de l' ĉambro okupis longa tablo, ornamita per multaj inkmakuloj, kaj apud la tablo, sur lignaj seĝoj malmolaj, sidis du eble dek-du-jaraj knaboj.

La blondulo tradukis malfacilan frazon el *Cornelius Nepos**) kaj ĝemante traserĉis la latinan vortaron grandvoluman, dum la brunulo klopodis solvi la problemon de kuba radiko.

La filologo estis nomata Hans kaj la matematikisto Heinz (Hejnc).

Kelkafoje la knaboj levis la kapojn de super la libroj, sopire rigardante al la malfermita fenestro, tra kiu zumantaj muŝoj flugis tien kaj reen.

En la ĝardeno kuŝis ora sunbrilo sur arboj kaj plektbariloj, kaj kvazaŭ mokeme branĉo de floranta siringo rigardadis tra la fenestro en la studejon de la du esperoplenaj knaboj.

Ankoraŭ tutan horon ili estis laborontaj, antaŭ ol ili havis permeson, forlasi la ĉambron, kaj la minutoj forrampis kiel la limakoj sur la grosujoj de l' ĝardeno.

Estis ne eble, jam nun iri en la ĝardenon, ĉar en la apuda ĉambro sidis apud skribotablo Doktoro Disbatulo, la edukisto de la knaboj, kaj la pordo inter la du ĉambroj estis larĝe malfermita, por ke la doktoro ĉiutempe povu observi la faron de siaj protektatoj.

„Hanibalo vere estus povinta fari ion pli bonan, ol marŝi trans la Alpoj“, ĝemis Hans, kaj „naŭoble okdek unu estas sepcent dudek naŭ“ flustris Heinz.

Poste ambaŭ suprenrigardis de super siaj laboraĵoj kaj oscedante rigardis unu la alian.

Subite ili ekaŭdis laŭtan zumadon. Orskarabo*), kiu eble sidis ekstere sur la siringo, devojigis en la ĉambron. Trifoje ĝi rondflugis ĉirkaŭ la kapoj de la knaboj kaj subite — klak — ĝi falis en la inkujon.

„Ĝi ne meritas ion pli bonan“, diris Heinz, kial ĝi ne restas, kie ĝi bonfartas. Sed droni en inko tamen estas tro mizera, kruela morto. Atendu kamarado, mi vin savos.“

Li estis liberigonta la baraktantan skarabon per plumingo, sed pli rapide Hans savis ĝin per fingro.

Poste la knaboj sekigis la bedaŭrindulon per sorbopapero kaj observis, kiamaniere ĝi sin purigis per siaj antaŭpiedoj.

„Ruĝan spegulon ĝi havas sur la torako kaj nigrajn palpilojn“, diris Hans, purigante siajn fingrojn je la kapharoj, „ĝi estas la orskaraba reĝo. Ĝi loĝas en belega kastelo, konstruita el jasmenaj floroj kaj tegita per rozfolioj. Griloj kaj cikadoj estas ĝiaj muzikistoj kaj lampiroj**) estas ĝiaj torĉportistoj.“

„Vi parolas sencesence“ diris Heinz.

„Kaj kiu renkontas la orskaraban reĝon“, daŭrigis Hans, „estas feliĉulo. Atentu Heinz, io okazos — aventuro aŭ iu strangaĵo, krom tio hodiaŭ estas la unua de Majo kaj certe ia mirindaĵo okazos. Rigardu, kiel ĝi nin salutas per la palpiloj kaj kiel ĝi levas la kovrilflugilojn. Tuj ĝi aliformiĝos kaj staros antaŭ ni kiel elfo kun reĝa mantelo kaj ora kasko sur la kapo.“

„Sensencaĵo! Ĝi forflugos“, diris Heinz, ridante. „Jen ĝi flugas!“

La knaboj iris al la fenestro, postrigardante la skarabon. En vasta kurbo la brilanta juvelo

*) Fame konata roma historiisto (ĉirkaŭ 95—25 antaŭ Kristo).

*) *Cetonia aurata* (lat.).

**) *Lampyrus noctiluca* (lat.).

traflugis la aeron kaj malaperis transe de la ĝardenmuro.

El la apuda ĉambro kraĉotuso estis aŭdebla, kaj rapidege ambaŭ lernantoj reokupis siajn seĝojn.

„Jen estas la mirindaĵo“, mallaŭte diris Hans al sia kamarado, montrante al la inkujo, el kiu elstaris verda branĉeto, kiu videble kreskados ĝis la plafono.

„Ni songas,“ diris Heinz, frotante siajn okulojn.

„Ne, estas fabelo,“ kontraŭdiris Hans, „viva fabelo kaj ni kunludas.“

Kaj la branĉeto pli kaj pli dikiĝis. Novaj branĉetoj elkreskadis, formante branĉojn kaj branĉegojn, kovritajn per folioj kaj burĝonoj. Plafono kaj muroj de la ĉambro malaperis kaj krepuska arbaro ĉirkaŭis la knabojn miregantajn.

„Antaŭen“, ekkriis Hans, kuntirante la kontraŭstarantan Heinz. „Nun venos aventuro“.

La florantaj arbetoj disiĝis, malfermigante vojon al la knaboj. Orbrilanta sunlumo radiis tra la foliaro de la arboj, pentrante mil orajn ringojn sur la muskon, el kiu eliĝis stelfloroj multkoloraj, kaj verda, krispa hedero volverampis ĉirkaŭ la trunkoj muskokovritaj. Sed supre en la branĉaro flugetis kaj saltetis kantantaj birdoj, vestitaj per brilanta plumaro.

Cervoj, kapreoloj kaj aliaj arbarbestoj gaje saltadis tra la arbetoj.

Nun la arbaro maldensiĝis. Inter la arbo-trunkoj io kvazaŭ fajrobriladis kaj Hans flustris al Heinz: „Nun okazos!“

Ili suriris arbarherbejon, en kies mezo staris arbo. Sed ĝi ne estis ordinara arbo; estis mirakla arbo, pri kiu Hans ofte aŭdis: ĝi estis la orfolia arbo.

La knaboj konsternite haltis. El post la arbo antaŭenpaŝis pigmeo, ne pli granda ol trijara infano, sed ne dikkapa kaj platpieda, kiel ili ĝenerale estas, sed belstatura kaj gracia. Li surhavis verdan mantelon kaj oran kaskon, kaj la knaboj bone sciis, kiu staris antaŭ ili.

La etulo antaŭeniris kelkajn paŝojn kaj riverencis: „La ensorcita principino atendas sian liberigonton,“ diris li, „kiu el vi ambaŭ volas fari tiun riskaĵon?“

„Mi,“ diris Hans ĝojavoĉe. Kaj tuj la etulo alkondukis kuraĝan ĉevaleton laktoblan, selitan per ora selajaro.

„Ne faru tion, Hans!“, admonis Heinz timeme, sed Hans jam sidis sur la selo. Blekante la sorĉa ĉevalo obstine stariĝis, reĵetis la kapon, kaj kun flugetantaj kolharoj ĝi forkuregis en la arbaron.

Kiel vojmontranto antaŭenflugis lumiganta orskarabo. Ankoraŭ unufoje Hans returnis la kapon kaj vidis sian kamaradon starantan sub la ora arbo; poste el siaj rigardoj li perdis arbon kaj amikon.

Estis gaja rajdado. Hans sidis sur la selo tiel firme, kvazaŭ li estus sidanta sur lerneja benko. Kiam li pensis, ke ankoraŭ antaŭ unu horo li ĝemis pri Cornelius Nepos kaj tremis pro sia severa instruisto, li devis ridi.

La malgranda lernanto en la mallonga jaketo nun fariĝis belega majesta rajdanto kun tuniko kaj mantelo, kun glavo kaj oraj spronoj.

Nun lia ĉevaleto gaje eklekis. La arbaro maldensiĝis. Nur ankoraŭ kelkajn saltojn, kaj la rajdanto haltis antaŭ briletanta kastelo. Multkoloraj flagoj flirtis sur la turoj, kornoj kaj trumpetoj eksonis, kaj sur la subtegmenta teraso staris la principino kaj per blanka naztuketo salutis bonvenon al la alvenanto.

Preskaŭ ŝi aspektis kiel Lenjo, la filineto de l' najbaro, kun kiu la kavaliro Hans ofte estis ludinta, kiam li ankoraŭ estis knabo, kiam li iris en la lernejon; nur pli granda ŝi estis kaj multfoje pli bela.

Hans saltis de sur la selo kaj kun tintantaj spronoj suprenrapidis la ŝtuparon marmoran. En la malfermita kastelpordego staris viro, konjekteble la kortegmarŝalo de la principino, kiun Hans ŝajne konis.

Kaj la marŝalo etendis sian manon, prenis la orelon de la kavaliro Hans kaj ekkriis:

„Ekdorminta estas la sentaŭgulo. Atentu, mi vin punos!“

Jen la sorĉo finiĝis! Hans ree sidis apud la tablo inkmakulita, antaŭ li kuŝis Cornelius Nepos kaj latina vortaro, kontraŭ li sidis Heinz kaj skribis, ke la plumo grincadis, kaj apud li staris Doktoro Disbatulo, severe rigardante tra siaj okulvitroj la songintan revulon.

Kiam fine la libertempa horo alvenis kaj la du knaboj ekstere en la ĝardeno sub sambukarbo formangiĝis sian vespermanĝon, Hans rakontis al sia amiko sian songon.

„Tio estas mirinda“, diris Heinz, kiam Hans finis, „treege mirinda! La saman songon ankaŭ mi mem havis. Nur la fino estis alia. Ensorcita kastelo en mia songo ne ekzistis.“

„Rakontu!“ instigis Hans.

„Ĝis la ora arbo mia songo tute similas al la via. Vi supreniris la blankĉevalon kaj forrajdis, por liberigi la principinon, sed mi —“

„Nu?“, demandis Hans scivole.

„Mi postrestis, skuis la arbon kaj plenigis ĉiujn miajn poŝojn per oraj folioj. Poste la malbona doktoro vekis min, kaj la tuta brilego malaperis.“

„Heinz“, solene diris Hans, prenante lian manon, „se du homoj songas la saman, certe tiu songo realiĝos. La songo estis profeta. Rememoru mian diron!“

Poste la knaboj manĝis la restaĵojn de sia vespermanĝo kaj komencis pilkludon.

Cu la songoj de la knaboj realiĝis? — Jes! —

Hans fariĝis poeto kaj gaje trotigis sian ĉevaleton tra la verda fabelarbaro, sed Heinz, kiu en sonĝo skuis la oran arbon, fariĝis lia — eldonisto.

Rajtigita traduko de
Otto Emmert

Venu ĉiuj al Parizo!

Ŝercversajo

de

Raymond Schwartz

Kun ĝojplena la valizo
Venu ĉiuj al Parizo!
Kun batanta, febra koro
Plenplenegaj je fervoro!

Verda estu la ĉapelo,
Verda estu la mantelo,
Verdaj estu viaj ŝuoj
Kaj la pantalonaj truoj!

Kun brodita verdĉemizo
Venu ĉiuj al Parizo!
Venu kun edzin' kaj ido
Al la festo de l' revido!

Lasta adiaŭ

Ke eĉ plej brila tago de somero
Envolvas sin en ombran grizvualon,
Ke ĝi vespere la nebulan palon
Sin etendigas ĉien, — kruda vero!

„Ne estingiĝu, lasta sunflamero!“
En mi kriegas prema korsopiro. —
Ĉu haltigebla estas la transiro
Almorta de karulo? — Kruda vero!

Julie Wolfson, Breslau

Enhavo de G. E. 6 A: Leteroj al nova esperantisto: 4. Post la naŭa germana kongreso — lomi pri la Lingva Komitato — Devo kaj rajto de vojaĝanta esperantisto en poŝtoficejo — 10. Esperanto-Weltkongreß in Paris — Pri nia karavano al la Deko — Kroniko el germanlingvaj landoj — Internationale Esperanto-Bewegung — Esperanto im Kongreß der Vereinigten Staaten von Nordamerika — Ekspozicioj kaj propagandaj aranĝoj — Alvokoj — Für und wider — Bibliografio — Redakcia korespondo — Oficialaj sciigoj de Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.): Rundschreiben Nr. 30.

≡ Tra Esperantujo ≡

Deka Universala Kongreso de Esperanto

Por helpi la „Dekan“

Fiksante je la 1a de Junio la lastan templimon por aliĝi por 15 Fr., ni celis rapide havigi al la kongreso sufiĉe grandan nombron da partoprenantoj. La celo estas atingita, ĉar antaŭ la 1a de Junio ni ricevis pli ol 3000 aliĝojn. Al ĉiuj ni sincere dankas.

Eble tamen kelkaj samideanoj, pro neriĉeco aŭ alia kaŭzo, ankoraŭ ne povis sendi sian aliĝon. Ĉi tiujn ni deziras favori. Estante nun certaj, ke ni ne kompromitos la sukceson de la afero, ni povas prokrasti la templimon; kaj tion povante fari, ni faras.

Do, la templimo estas prokrastita ĝis la 15a de Julio; antaŭ tiu dato la aliĝo kostos 15 Fr. (por familianoj, t. e. edzino kaj infanoj, 10 Fr.); post tiu dato ĝi kostos 25 respektive 20 Fr. — Kongresanoj, kiuj sendis 25-frankan aliĝon inter la 1a de Junio kaj la 15a de Julio, ricevos la troan monon en la Akceptejo.

Estas neeble, konservi la saman prezon ĝis la kongreso mem; efektive personoj, kiuj aliĝos ekz. je la 25a de Julio, kaŭzos al ni certe tre grandan plezuron, sed ankaŭ laboron pli malfacilan kaj karan: juste estas, ke ili pagu ĝin. Aliparte tio ne ĝenos la verajn ŝparemulojn, ĉar persono, kiu ne kapablis en naŭ monatoj kunigi 15 Fr., en du semajnoj kredeble ankaŭ ne kapablos tion fari.

Ni estas certaj, ke vi, karaj esperantistoj, kvankam vi nun rajtas malfrue aliĝi, tamen klopodos, por aliĝi tuj. Vi disponas la monon kaj spiritan rimedon, — ni la laboremon. Ni kuniĝu, kaj ni venkos.

La Organiza Komitato

Por la kongresanoj de la Deko

Oni scias, ke la Deko Kongreso organizas diversajn ekskursojn, por ke la kongresanoj povu konatiĝi kun la plej rimarkindaj vizitindaĵoj de la ĉirkaŭpariza regiono: al Fontainebleau (3 ekskursoj), al Versailles, al la belaj kasteloj ĉe la bordoj de rivero Loire, ktp.

Oni povas de nun ricevi belegajn albumojn de 24 ilustritaj poŝtkartoj pri tiuj diversaj vizitotaj monumentoj kaj pejzaĝoj kaj pri Parizo. Sufiĉas sendi al S-ro Ch. Verax, scienca fotografisto, 35 B-d Arago, Paris, po 0,450 Sm. por ĉiu dezirata albumo, kaj oni tuj ricevos ilin afrankite.

Jen la albumoj jam pretaj:

Parizo (2 albumoj); Kastelo de Fontainebleau; Silvo (praarbaro) de Fontainebleau; Kasteloj ĉe la bordoj de Loire; Kastelo de Chantilly; la Katedraloj de Franclando; Himerstatuoj de la katedralo Notre-Dame de Parizo; la Trezoro de Notre-Dame de Parizo; Muzeo de Louvre; Muzeo de Luxembourg (skulptaĵoj kaj pentraĵoj).

Aliparte, aperis en la numero 28 de *Scienca Gazeto* speciala artikolo pri la arbarego de Fontainebleau, vera silvo kun strangaj haosoj de rokoj; tiu artikolo klarigas la devenon de tiuj haosoj kaj priskribas la plej ĉefajn kuriozaĵojn. Oni povas ricevi tiun numeron,

sendante 0.200 Sm. per internaciaj respondkuponoj aŭ per francaj poŝtmarkoj (50 centimoj) al la redakcio de tiu gazeto, je sama adreso, kiel ĉi-supre.

Fakaj kongresoj

En la unua numero de *Kongresa Gazeto* la Organiza Komitato sciigis sian intencon, organizi fakajn kongresojn okazantajn en la samfakaj parizaj medioj — kaj dediĉi unu tutan tagon por tiuj specialaj kongresoj.

Por ebligi tiun organizadon, la komitato petis la diversajn esperantistajn societojn de specialistoj, elekti unu parizan membron, kiu akceptos okupi sin je tiu preparado. Komprenoble tiuj specialistaj parizaj organizantoj konservos plej grandan sendependecon por la aranĝo de la manifestadoj de sia faka kongreso; sed ili interrilatiĝos kun la komitato, kiu siaflanke kunordigos laŭbezone tiujn manifestadojn.

La Organiza Komitato konstatis kun ĝojo, ke tiu ideo estas tre bone komprenita kaj akceptita. Ni liveras sube la liston de la societoj, kiuj de nun klopodas pri sia faka kongreso, kaj la nomojn kaj adresojn de la parizaj organizantoj:

- Abstinenculoj** — S-ro Ch. Touzet, 65, rue du Moulin-Vert, Paris
Arhitektaristoj kaj Inĝenieroj — S-ro Agache, 11, rue Eugène-Flachat, Paris
Blinduloj — S-ro Th. Cart, 12, rue Soufflot, Paris
Bontemplanoj — S-ro Touzet, adreso supre
Farmaciistoj — S-ro Rousseau, 4, place de la République, Levallois-Perret, Seine
Feministoj — F-ino Gérard, 9, rue d'Armaillé, Paris
Fervojistoj — S-ro Tessez, 7, boul. Rochechouart, Paris
Framasonoj — S-ro Camescasse, 1 bis, rue Lallier, Paris
Instruistoj — S-ro Aizière, rue de Berlin, Alfortville, Seine
Juristoj — S-ro de Lajarte, 6, villa d'Orléans, Fontenay-sous-Bois, Seine
Katolikoj — S-ro Colas, 7, rue des Marronniers, Montmagny, Seine-et-Oise.
Kuracistoj — S-ro Dro Artigues, 142, rue de Courcelles, Paris
Laboristoj, Socialistoj — S-ro Habert, 121, rue de la Convention, Paris
Liberpensuloj — S-ro Guillemin, 53, rue Damesme, Paris
Policistoj — S-ro Tison, policinspektoro, Section A, Préfecture de Police, Paris
Poŝtistoj — S-ro Michelis di Rienzi, 20, avenue Reille, Paris
Psikistoj — S-ro Chaigneau, 6, rue de Douai, Paris
Publikoficistoj — S-ro Doué, 10, rue Charles-Divry, Paris
Sciencistoj — S-ro Rollet de l'Isle, 35, rue du Sommerard, Paris
Stenografiistoj — S-ro Flageul, 9, boulevard Voltaire, Issy-les-Moulineaux, Seine
Studentoj kaj Junuloj — S-ro Pichon, 28, rue Vauquelin, Paris
Teozofoj — S-ino Diou-Trouillon, 145, boulevard Malesherbes, Paris
Vegetaranoj — F-ino Beauvais, 10, rue Amyot, Paris
Verkistoj — (organizanto ne montrita).

Dezirinde estas, ke la organizantoj konu kiel eble plej baldaŭ la nombron de la ĉeestontoj. Pro tio ni insiste petas ĉiun kongresanon, ke li bonvolu sciigi al la rilata organizanto la fakan kongreson, kiun li intencas ĉeesti.

Ni memorigas, ke ĉiuj fakaj kongresoj okazos la saman tagon; eble tio kaŭzos iom da malagrablo al tiuj kongresanoj, kiuj interesiĝas pri kelkaj fakoj. Sed ne eble estas, alimaniere aranĝi la aferon, pro la granda nombro da manifestadoj okazantaj dum la ok tagoj de la kongreso, kaj aliparte ni klopodos, por ke ĉiuj kunsidoj de la fakaj kongresoj ne samhore okazu.

(El *Kongresa Gazeto*)

Samideanoj!

Vizitu la Dekan Kongreson en Paris
kaj aliĝu al la germana karavano!

Esperanto en Hindujo

Profesoro *J. N. Unwalla*, ĉe la Centra Hinda Kolegio en *Benares* (Hindujo), sendigis al ni per angla samideano ekzempleron de la hindolingva revuo *Sarasvati*, aperanta en Allahabad. Tiu numero enhavas longan artikolon pri Esperanto, ilustritan per granda portreto de Dro Zamenhof, kaj la artikolo mem estas bona signo de la ĉiam kreskanta intereso pri Esperanto en Hindujo.

S-ro Unwalla estas eminenta profesoro de angla lingvo ĉe la nomita kolegio, sed li instruas, jam de kelkaj jaroj, ankaŭ Esperanton kaj nun havas 50—60 lernantojn de nia lingvo en tiu kolegio. Unu el liaj lernantoj verkis la diritan artikolon, kiu elvokis multajn petojn pri pliaj sciigoj.

La redaktoro de la bone konata kaj alte ŝatata revuo *Sarasvati* estas la tre eminenta ĵurnalisto *Mahavir Prasât Dvivedi*, kies favora akcepto de Esperanto estas nur unu el multaj signoj de lia vastema larĝspiriteco en lando de ĵarmila konservatismo.

Certe niaj legantoj konsentos pri tio, ke ni, ankaŭ en ilia nomo, sendas al S-ro Dvivedi sincerajn bondezirojn kaj koran dankon pro liaj klopodoj. Prof. Unwalla, kiu same meritas dankon, volonte donas al ĉiu pliajn sciigojn pri la nuna stato de Esperanto en sia lando. Kvankam ne plu juna laŭ korpo, li tamen estas ankoraŭ ĉiam ĵunkora, gaja kaj fervora por nia afero.

Sendube interesos niajn legantojn, ekscii, ke la nomo *Sarasvati* estas tiu de la hinda diino de saĝeco, identa al Minerva aŭ Pallas Athene. G. E.

Lingvaj demandoj

La vortfarado laŭ la Fundamento

Sub tiu ĉi titolo aperis antaŭ kelke da semajnoj grava verko de *Paul Fruictier*, kiun jam mallonge recenzis *Lr* *); ĉi tie estu dirataj pli ĝeneralaj konsideroj.

En la daŭro de la lastaj jaroj aperis tuta vico da tiaspecaj verkoj; kaj tamen oni ne povas diri, ke ĉiuj enhavas la samon, nek, ke ili estas senutilaj. Mi nomas nur la verkon de *Ĉefeĉ*, tiun de *R. de Saussure* (*Antido*), de *Dro Panel* kaj la nunan.

Estas eble tro malmodeste kaj malĝentile, se mi ĝin diras, tamen mia opinio neniu el ili vere kaj plene solvas la demandon, aŭ pli ĝuste: tute ne ekzistas solvota demando, ili ĉiuj nur komentas tion, kio jam delonge estas aplikadata. Plej interesa estas certe la studo de S-ro H. F. Höveler (*Ĉefeĉ*), sed ankaŭ plej teoria, tiom, ke nur tre malmultaj esperantistoj ĝin elkomprenis. Tamen, praktike aplikite, tiu teorio rezultigas la ĝenerale uzatan Esperanton. Rekte kontraŭa al la *Ĉefeĉ*'a teorio estas tiu de *Antido*: kaj tamen praktike ili kondukas ambaŭ al la sama rezultato! Kaj vere la diferenco inter la du teorioj ne estas tiom grandega, kiom ĝi ŝajnas unuamomente; ĉar kvankam *Ĉefeĉ* neas la substantivan, adjektivan ktp. karakteron de la radikoj, li tamen tion akceptas, parolante pri la sukero

*) Vidu n-ron 5 B, pĝ. 79.

kiel „la io esence sukera“. Tio ja entenas, ke *suker* esence estas sukero, la aĵo mem; la diferenco estas nur, ke laŭ li tiu karaktero enestas nur laŭsence, dum Antido pretendas gramatikan karakteron. Tamen ĉe la vortfarado estas tute egale, kia estas tiu karaktero, se ĝi nur enestas en la radiko. Estas ne pridisputebla, ke la plejmulto de la radikoj enhavas laŭ sia esenca signifo karakteron konkretan aŭ abstraktan, kaj la abstraktaj karakteron senmovan (kvalitan) kaj movan (agan aŭ daŭran). Sed certe Ĉefeĉ estas prava, se li kontraŭbatalas la pure gramatikan enklasiĝon de la radikoj, proponitan de Antido; la plej taŭga maniero estas, kiun jam Zamenhof elektis, nome per nacilingvaj tradukoj elmontri la plej esencan enhavon de la radikoj. *Hom'* do per si mem ne estas homo, sed ĝia senco plej proksimiĝas al ĝi.

La saman teorion apogas Dro Panel, kaj tre simile opinias S-ro Fruictier.

Lia verko tamen ne estas kalkulebla al la teoriaj; ĝi staras tute sur la bazo de l' ĝenerala uzado. Ne teorion li volas doni, sed ekzemplojn; kaj certe la plimulto lernas pli per ili, ol per amaso da pli-malpli digestitaj teorioj. Tial mia konsilo al ĉiu perfektigemulo estas: legu kaj ree legu tiun sisteman ekzercon, ĝi estas vera orminejo por la serĉanto!

Mi ne volas certigi, ke la libro estas senerara; sed se oni legis kelkajn dekojn da „Esperante“ verkitaĵoj, post ili ĝi estas vera ripozo por spirito kaj okuloj. Simplaj, senartifikaj frazoj, preskaŭ tuta evito de preseraroj, jen, amiko, kion vi deziras pli?

Al plej diligenta atento de la legantoj mi rekomendas la pritraktojn pri *-ata*, *-ita*, pri *-eg-*, pri *iĝi*, pri la uzado de *por* kaj *pro*. Ne ĝustaj, parte iom naivaj estas la asertoj pri *de* post pasivo (kiu diris al la aŭtoro, ke post pasivo ĉiam devas stari „de“? Zamenhof nur diras, ke la aganto en aktiva formo estas en pasivo signata per *de*; kaj tio estas ĉiam vera; en frazoj kiel „la montoj estas kovritaj per neĝo“ la aginto subpensata estas la naturo.) Ĉu efektive oni diras pro belsoneco *problindula* anstataŭ *porblindula*? Eĉ ĉu oni nepre tiel diras? Mi dubegas. Ankaŭ pri la nepra uzado de *al* post aktivaj substantivoj oni povas diskuti; kvankam ofte utila, *al* tamen ne estas tre rekomendinda pro sia iom alia signifo; tre ofte oni povas sen danĝero uzi la pli ĝustsencan *de*.

La vortfaradaj reguloj, kiujn la libro enhavas, ŝajnas al mi iom tro rigidaj; estas pli bone, lasi ilin pli elastaj, tiel oni ne estos tiom ofte embarasata de kvazaŭesceptoj. Aferoj, kiel listo de verboj kunligoblaj kun *el*, aŭ prepozicioj „regantaj“ nominativon aŭ akuzativon, estas fantomoj, kiuj eĉ en la plej nigra nokto de Esperantujo ne devus aperi.

Fine mi volas atentigi pri tio, ke „erari estas home“, eĉ se oni tre bone scias la regulojn kaj mem akcentas, kiom ofte ili estas malobeataj. Koncerne tion mi memoras malnovan anekdoton: La instruisto klarigas al la lernantoj, ke en Esperanto oni ne ŝatas uzi la pasivon, kaj se tamen, oni uzas la prepozicion *de*, por signi la aganton. Sian instruon li poste finas per la vortoj: „Tiu regulo estu bone memorata per vi!“ — Simile ni trovas en la libro (krom malĝusta uzo de *ĉu* — *ĉu*, kiun eble nur poloj scias korekte uzi) la frazojn: dum *presig*as tiu libro; *okazebla*, *pozebla*; la radiko *patr'* estas iafoje uzita kun . . . k. s.

Nu, estas ja nur kelke da tiaĵoj; entute vera trezorejo estas tiu nova libro pri la vortfarado, la

unua, kiu ne volas starigi novajn teoriojn, sed kontentiĝas per la tasko, sisteme montri la vortfaradon tia, kia ĝi estas. Mi povas nur ripeti: por praktika studo ĝi estas la plej bona libro pri tiu temo.

Mallonga respondo

Pri „*sterblich, vergänglich, lehrreich*“. Vi eraras, opiniante, ke *ema* signifas nur inklinon deziratan; kial? Ekzemple: malsanema homo ne volas esti malsana, li nur inklinas al malsano; tial ankaŭ *mortema* povas sufiĉe taŭge esprimi „*sterblich*“. En kelkaj okazoj *mortonta* pli bone trafas la sencon; pri *pere-ema* same. „*Lehrreich*“ estas simple *instrua, instruanta*, aŭ eĉ laŭvorte *instruiciĉa, -plena*, aŭ *instrupova*. — Vi vidas, ke la sencoj estas tre malsamaj. Kiel do venas al vi la ideo, esprimi ĉiujn per unu sama sufikso; kaj kial ĝuste per *-iv-??*

Diverscelaj kongresoj kaj kunvenoj

Kongreso de Homaranoj

De la 12a ĝis inkluzive la 14a de Aŭgusto 1914 okazos en Bern (Svisujo) kongreso de „Homaranoj“, t. e. de homoj, kiuj, akceptante la necesan dividiĝon de la homaro laŭ regnoj kaj landoj kaj *alte estimante la amon al sia patrujo kaj la fidelecon al sia regno*, malaprobis la dividiĝon de la homaro laŭ reciproke sin malamantaj *gentoj* kaj volas esti ne ŝovinismaj *gentanoj*, sed nur *homoj* kaj civitanoj de siaj landoj.

La kongreso estos ekskluzive *labora*; ĝi enhavos en si neniam paradajn oficialaĵojn, festojn aŭ amuzaĵojn kaj publikigos pri si neniam reklamajn artikolojn en gazetoj. Ĉar la laboro de la kongreso estos nur *prepara*, kaj ĉar bona interkompreniĝado inter la partoprenantoj de tia kongreso estas pli grava ol ilia multeco, tial ĉiuj diskutoj estos farataj en unu sola lingvo, nome en *Esperanto*. Oni sekve povus aranĝi la kongreson de Homaranoj kiel fakan sekcion de la universala kongreso de esperantistoj; tamen la aranĝantoj estas devigitaj ne fari tion, por ke la ekstera mondo ne intermiksi la Homaranismon kun Esperanto. La ĉefa laboro de la kongreso de Homaranoj estos:

1. Per komuna interkonsiliĝo kaj interinformiĝo oni esploros, ĉu ne ekzistas jam en la mondo ia partio, kies principoj estas similaj al la principoj de la Homaranismo; se montriĝos, ke tia partio jam ekzistas, oni proponos al la Homaranoj, aliĝi al ĝi, por ne malŝpari kaj ne disbati la fortojn de la samcelanoj per malutila kreado de io nova.
2. Se montriĝos, ke dirita partio ankoraŭ ne ekzistas, oni klopodos krei tian partion per ellaboro de difinita programa deklaro, kiun devos akcepti por si ĉiu, kiu volas aparteni al tiu partio; en tiu okazo, por faciligi la laborojn, oni prenos kiel bazon de diskutado la ĝis nun ekzistantan privatan „Deklaracion pri Homaranismo“, kaj post detala pridiskuto de ĉiu paragrafo oni feros en tiu deklaro ĉiujn necesajn ŝanĝojn, elĵetojn aŭ aldonojn.

3. Oni pridiskutos la ideon, elekti iun urbon en la gente, lingve kaj religie neŭtrala Svisujo, kiel konstantan centron homaranisman kaj kiel lokon de ĉiujaraj kongresoj kaj festoj de Homaranoj, per iom-post-ioma fondo de centra homarana edukejo kaj aliaj homaranaj kulturaj institucioj krei en tiu urbo centron de neŭtrale-homa kulturo por tiuj multaj milionoj da homoj en la mondo, kiuj ŝovisme krei propran gentan kulturon ne volas aŭ ne povas, kaj por kiuj la ĉerpado de kulturo en la lingvo kaj spirito de siaj najbaroj aŭ malamiko estas tro humiliga kaj maloportuna.

En la kongreso de Homaranoj povos partopreni nur tiuj personoj, kiuj deklaras, ke ili principe aliĝas al la esenco de la ĝisnuna „Deklaracio pri Homaranismo“, kvankam ili eble ne konsentas kun tiu aŭ alia detalo, kaj kvankam ĉiu havos la rajton, repreni sian aliĝon, se la starigota definitiva formo de la Deklaracio ne plaĉos al li.

La partoprenantoj de la kongreso pagos *nenian kotizon* kaj ricevas *nenian kongresan karton*. Por siaj loĝejoj kaj manĝado ĉiu kongresano pagos *mem* al tiu hotelo, kiun li al si elektos (la Organiza Komitato helpas nur al tiuj kongresanoj, kiuj *petos* tian helpon). Por la kunsidoj ni klopodos trovi ĉambron aŭ ĉambregon *senpagan*; nur en la okazo, se tio ne estos farebla kaj se ni devos lui specialan ĉambregon, ni kolektos inter la kongresanoj jam dum la kongreso mem la necesan sumon per laŭvolaj kaj laŭpovaj monoferoj.

Sed por ke ni povu ĝustatempe ĉion antaŭarangĝi, ni *insiste petas*, ke ĉiu, kiu intencas partopreni en la kongreso de Homaranoj, bonvolu sciigi nin pri tio *kiel eble plej frue*. Personoj, kiuj volas partopreni en la laboroj, sed ne povas veni al la kongreso, estas petataj sendi siajn opiniojn kaj proponojn *letere*.

Ĉiuj leteroj por la Organiza Komitato de la kongreso devas esti sendataj laŭ la adreso:

S-ro J. Schmid, *Steigerweg 26, Bern (Svisujo)*.

Noto de la redakcio — Kiel eventuala bazo por la diskutoj en la kongreso de Homaranoj servos la provizora *Deklaracio pri Homaranismo*, starigita de Dro Zamenhof. (Vidu la bibliografian parton de tiu ĉi numero.) La Esperanta teksto de la deklaracio estas havebla ĉe S-ro Schmidt en Bern (adr. vidu supre).

21a Internacia Kongreso pri paco en Wien

15a ĝis 19a de Septembro 1914

En Aŭgusto de la pasinta jaro la 20a Internacia Kongreso pri paco en Hago per akلامo decidis, okazigi la 21an kongreson en Wien. La pacifistoj en Aŭstrio ĝoje prenis sur sin la taskon de inda aranĝo de la festo kaj de afabla akcepto de kunlaborantoj, venontaj el ĉiuj landoj, por pritrakti la eminentan problemon de la mondpaco.

Oni preparos ĉion, por ke la kongreso en la belega urbo apud Danubo fariĝu ĉiurilate brila.

Gravaj temoj pri internacia rajto, pri internacia interkompreniĝo kaj pri interŝtataj organizoj reprezentas la ĉefajn punktojn de la programo, ellaborita de la internacia komisiono de la internacia oficejo por paco en Bern. En ĉiuj landoj eminentaj personoj akceptis referatojn, kaj la kongresanoj havos okazon, partopreni la diskutadon. La novtempaj postuloj pri

garantio por la mondpaco estos deklarataj kaj la aktualaj problemoj pri internacia organizo disvolvataj. Krom seriozaj laborkunsidoj ankaŭ estos aranĝataj festoj, je kiuj oni povos pridiskuti en pli intima formo diversajn aferojn.

La organiza komitato invitas al tiu kongreso ĉiujn societojn, instituciojn kaj privatajn personojn, kiuj deziras kunlabori aŭ subteni la laborantojn de la granda porpaca festo.

La 20an de Septembro la kongresanoj veturos Budapeŝt-on, kie ankaŭ okazos diversaj aranĝoj.

Samideanoj!


Klopodu, ke multaj esperantistoj partoprenu ĉi tiun kongreson. Nur tiel estos eble, organizi apartan sektion de esperantistoj, en kiu oni povos diskuti per nia lingvo. Eksciante eventuale jam nun, kiu el viaj samlandanoj estas vizitonta la kongreson, vi eble povas uzi vian personan influon, ke li ĝis Septembro ellernu nian lingvon. Ju pli da eksterlandaj esperantistoj kunvenos, des pli grava kaj akcelanta estos la afero por nia movado.

Ĉiuj samideanoj bonvolu anonci sian intereson pri la kongreso al la redakcio de *German-Aŭstria Esperantisto*, Kaiserstr. 10, Wien VII. Se ilia nombro estos granda, oni certe sukcesos eldonigi la prospekton en Esperanto.

La samideanoj en Wien kun granda ĝojo salutos siajn eksterlandajn amikojn!

Sub la sankta signo de l'espero
Kolektiĝas paca batalantoj!

(El *German-Aŭstria Esperantisto*)



Esperanta puparo en Parizo

La geesperantistojn, kiuj intencas ĉeesti la Dekan Kongreson, kaj ankaŭ la gesamideanojn, kiuj ne povos veni Parizon, plezure ni atentigas pri la puparo de F-ino Laure de Laporte.

Tiu puparo konsistas el pli ol cent pupoj, vestitaj laŭ la kostumoj de provincoj francaj aŭ alilandaj; la plej multaj pupoj estas kolektitaj dank' al Esperanta korespondado.

La kolektistino estos tre danka al ĉiuj gesamideanoj, kiuj bonvolos havigi al ŝi aliajn pupojn; sed ŝi postulas, ke oni nenium pupon sendu, ne interkonsentinte kun ŝi pri la grandeco, beleco kaj kosto de l'pupo.

Oni bonvolu skribi al *F-ino Laure de Laporte*, 50, Boulevard de l'Hôpital, Paris.

Al la atento de korespondantoj kaj interŝanĝistoj

La esperantista interŝanĝistaro kaj korespondantaro estas invitataj, sendi siajn plenajn adresojn kun noto pri koresponda temo kaj interŝanĝa objekto kaj unu internacian respondkuponon por eldonota adresaro al la eldonejo

Interŝanĝema Esperantujo
Libau (Rusujo)

Bibliografio

Ĉiuj libroj markitaj per steleto estas riceveblaj per:

Ader & Borel G. m. b. H., Esperanto-Verlag, Dresden-A. 1,
Struvestraße 40.

(La montritaj prezoj ne entenas la sendkostojn, se tio ne estas dirita.)

Ĉi tie ni recenzas nur verkojn duoble ricevitajn.

Korekto — Per bedaŭrinda neatento de la preseja engaĝigisto en n-ro 5 B okazis konfuzo inter la titolo kaj la teksto de la recenzo staranta en unua loko. La titolo montras la portugalan vortaron, dum la teksto rilatas al

* **Dictionnaire Usuel Français-Esperanto** par E. Grosjean-Maupin. VIII + 392 pĝ., 9¹/₂ × 12 cm, tole bindita — Hachette & Co., Paris. 1914 — Pr: 1.500 Sm.

Niaj legantoj kaj la verkinto de la recenzo bonvolu pardoni la eraron kaj korekti la titolon laŭ la supra sciigo.

La redakcio

* **Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache** mit Übungen, Syntax und Proben aus Poesie und Prosa von J. Borel (13. Auflage, 55. Tausend) in **Blindenschrift**. 259 S., 26 × 23 cm — Herausgegeben und gedruckt von der Vinckeschen Provinzial-Blindenanstalt, Paderborn. 1913 — Pr: geb. 4.50 M, einschl. Schlüssel (s. unten). [197]

* **Schlüssel zum Esperanto-Lehrbuch** von J. Borel in **Blindenschrift**. 95 S., 26 × 23 cm, geheftet (s. oben). [198]

Es ist dankbar zu begrüßen, daß die Provinzial-Blindenanstalt zu Paderborn die immerhin recht schwierige Herausgabe des bekannten Borel'schen Lehrbuches in Braille'scher Punkschrift unternommen hat.

Es ist jedoch recht fraglich, ob es angeht, ein Lehrbuch für Sehende ohne weiteres in Blindenschrift zu übertragen. Absätze, übersichtliche Zusammenstellungen, die der Sehende gewissermaßen mit einem Blick erfassen kann, bieten dem Blinden insofern Schwierigkeiten, als es ihm unmöglich oder doch fast unmöglich ist, solche zusammengehörigen Stellen, Abschnitte usw. mit seinen Fingern herauszufinden. Von diesem Gesichtspunkte aus möchte ich für etwaige spätere Ausgaben folgende Winke geben:

Größere Abschnitte sind zweckmäßig durch Auslassen einer ganzen Zeile hervorzuheben; kleinere zusammengehörige Absätze müssen dadurch gekennzeichnet werden, daß am Zeilenrande *mindestens* sechs Buchstaben eingerückt werden, so daß der Finger beim Heruntergleiten über die Seite ganz von selbst solche Stellen herausfindet. — Die Vokabeln jeder Lektion sind leider hintereinander gedruckt, so daß die Vokabelseiten genau so aussehen wie andere Textseiten und die Vokabeln selbst sehr schwer zu finden sind. Hier müßte bei einer Neuauflage unbedingt dafür gesorgt werden, daß die Vokabeln in Spaltendruck — bei dem vorliegenden Format ließen sich auf jede Seite zwei Spalten bringen — neben-

einander und zwar in jeder Lektion fortlaufend nummeriert und nach den deutschen Bedeutungen alphabetisch geordnet werden; jedenfalls empfehle ich jetzt schon, noch nachträglich etwa dem Schlüssel ein Esperanto-Deutsches und Deutsch-Esperanto-Wörterverzeichnis beizufügen, selbst wenn sich dadurch der Preis ein wenig erhöhen sollte. — Der Schlüssel des Lehrbuches leidet darunter, daß die zueinander gehörigen Beispiele und Übungssätze schwer herauszufinden sind; es wäre also recht wünschenswert, daß die Beispiele und Sätze jedes Übungsstückes unter sich nummeriert würden. — Ein sehr fühlbarer Mangel ist auch das Fehlen eines alphabetischen Inhaltsverzeichnisses; so ist es jetzt ganz unmöglich festzustellen, an welcher Stelle des Lehrbuches sich etwa Angaben über das rückbezügliche *Fürwort* befinden. — Die zahlreich vorhandenen Druckfehler beeinträchtigen zwar das Verständnis nicht, könnten aber gleichwohl vermieden werden.

In der Überzeugung, daß für den Blinden das *Beste gerade gut genug ist*, glaubte ich, diese Vorschläge zur Verbesserung dieses Esperanto-Lehrbuches für Blinde nicht unterlassen zu dürfen. Immerhin muß es die deutsche Blindenwelt freudig begrüßen, daß sie jetzt in der Lage ist, an der Hand eines ausführlichen Lehrbuches die für sie so wertvolle Esperantosprache zu erlernen. Hoffentlich entspricht der Erfolg der Veröffentlichung den gehegten Erwartungen!

Franz Döring, Charlottenburg, Dernburgstr. 48

* **Diccionario Portuguez-Esperanto** — Compilado por Tobias R. Leite — XXI + 417 pĝ., 9³/₄ × 15 cm — Francisco Alves & Ca., Rio de Janeiro, kaj Hachette & Cie., Paris; 1913 — Pr: 1,750 Sm. [174]

La apero de unua vortaro nacia-esperanta ĉiam grave influis la progresadon de nia lingvo en la rilata lando. Tiu ĉi fakto estis precipe rimarkinda en Germanujo. Fine posedas la portugalo-lingvanoj tian verkon, dank' al la laboroj de nia fervora samideano R. Leite, protagonisto de Esperanto en Brazilio. Modeste li nomas, en la antaŭparolo, tiun verkon de 417 paĝoj „ensaio“ (provo) de vortaro; pro tia serioza provo ni gratulas.

Ne enirante detalan kritikon pri la vortaro, ni almenaŭ deziras atentigi pri la valora ĉapitro, en kiu la aŭtoro faras komparan analizon de la vortrezoroj Esperanta kaj portugala. Li trovis en Esperanto ne malpli ol 1800 vortojn tute samajn je la portugalaĵaj, aŭ kies esperantigo postulis nur malgrandajn ortografijajn ŝanĝojn. Laŭ la kategorioj, la vortoj estas dividitaj en ses klasojn, por plifaciligi la logikan komparon. — Estus bone, se en aliaj naciaj-esperantaj vortaroj, precipe en la latinidaj, oni enkondukus tiajn utilajn tabelojn.

J. Borel

* **En la lando de la Blanka Monto.** De Léon Huot-Sordot. El la franca lingvo tradukis Dro Noël. (Kolekto de „Lingvo Internacia“.) 71 pĝ., 13¹/₂ × 19 cm. — Presa Esperantista Societo, Paris. 1913. Pr: 0.500 Sm. [151]

La nomo de Dro Noël estas sufiĉe konata; estas ja li, kiu per severa okulo gardas je la nepra pureco lingva de la plej fundamenta gazeto *Lingvo Internacia*. Oni do rajtas kun same severa okulo trafolumi tiun ĉi tradukon.

Mi tial komencos tuj per tia severa kritiko, por poste atentigi pri la bonaj flankoj. — P. 5: *Antaŭvorto*; ĉu estas nur vorto? ĉu ne klarigo, parolo, enkonduko? p. 6, l. 4: *iliaj* (siaj!); *lilako* (!) ĉu eble siringo? p. 10: „vagonaro movita per elektro ricevas . . .“; kio do nun movas ĝin? p. 11: *konita* (-ata) p. 12: *teruriga* (kial -ig-?) p. 13: „tiun sanigan pasion, pri *kio*“ (kiu) ktp. ktp. — Per tio mi volas nur montri, ke estas ne tiom facile, traduki bone kaj nekritikeble; sed samtempe mi rapidas eldiri, ke malgraŭ la eraretoj la libro estas tre flue kaj agrable legebla. Se la tradukinto kutimiĝus ankoraŭ metadi la komojn laŭ la internacia, Zamenhofs maniero, kaj se li perfortus sian lingvan senton, anstataŭante la subjunktivon en memstaraj frazoj per simpla indikativo (ĉar Esperanto havas nur kondiĉan modon, ne subjunktivon) lia stilo eĉ estus klasika; la supre cititaj eraroj estas ja facile korekteblaj, kelkaj eĉ eble devenas de la preso.

La enhavo de la libro estas tre atentinda. Ĝi tre vigle kaj imagige priskribas la montgiganton *Mont Blanc* (tiu nomo estas internacie konata, dum ĉe la Esp. traduko ne ĉiu pensos pri ĝi). Kun entuziasmo kaj sincera ĝojo je la naturo la aŭtoro gvidas nin al la regionoj de eterna neĝo, kaj efektive en tiu priskribo speguligas la tuta grandiozeco de la altmontaro.

La finon de la libro faras tabelo de la terminoj, kiujn la tradukinto uzis; ili estas, krom *ŝrundo* kaj *serako*, simplaj kunmetaĵoj, pli-malpli trafaj kaj kompreneblaj; ĉu *preno* por tenroko, roko, kiun oni manprenas por sin teni, estas sufiĉe komprenebla? Ankaŭ *pasigejo* estas iom neklara; *kunŝnuri sin* estas duba; ĉu ĝi signifas: alŝnuri sin al io, aŭ ĉu interŝnuri sin unu kun la alia? — Tamen ni devas saluti danke tiujn ĉi unuajn brikojn al la estonta konstruaĵo de alpinista terminaro.

La eksterajo de la libro estas tre agrabla, formato kaj preso bonegaj, kaj tuta aro da belaj bildoj apogas la interesan priskribon. Kiu povas entuziasmiĝi je la belaĵoj de l' glacia naturo, ne preterlasu aĉeti tiun ĉi valoran libron, ne karan.

Lr.

* **Pri solidareco inter esperantistoj** — de A. Nedoŝivin. (Eldono de Kovna Esperantista Societo) 11 pĝ., 12×17¹/₄ cm — Librejo „Esperanto“, Moskvo, 1913 — Pr: 0.100 Sm.

[194]

Estas tre imitinda ekzemplo, klarigi al la mondo la „solidarecon“ en nia granda Esperanta familio, ĉar nur tiu ĉi motivo estas, per kiu ni atentigas la dubeman publikon pri nia komuna afero kaj pri la venko de nia ideo. La broŝureto estas tre rekomendinda kaj haviginda por ĉiuj Esperantaj bibliotekoj, ĉar ĝi entenas tre klare la simplan, sed tre necesan postulon, konvinki la publikan opinion per nia „solidareco“; nur per komuna laboro ni atingos la celon. Paco kaj konkordo estu ankaŭ la interna simbolo de ĉiuj geesperantistoj!

Tacitulo

* **Der Homaranismus** — Von Dr. L. L. Zamenhof; aus der Zeitschrift „Homaro“ übersetzt von Dr. F. Uhlmann (13. Aufl. 1913; 1. bis 2. Tausend) — 8 S., 16×22¹/₄ cm. — Verlag: A. Thomrey, 20 chemin de Malley, Lausanne (Schweiz) — Pr: 0.15 M.

[178]

Malgranda broŝuro. Ĝi volas atentigi pri la unuigo de la tuta homaro sub la devizo: „Libereco en la kredo“. Pro tiu celo ĝi enhavas antaŭparolon de Dro Zamenhof.

P. T.

Pejzaĝoj en Aŭstrio — Ilustrita gvidlibro tra Aŭstrio, eldonita de la i. r. ministerio por fervojaj aferoj, Wien. 120 pĝ., 11¹/₄×15 cm — En Germanujo senpage havebla ĉe: Amtliches Verkehrs-Bureau der k. k. österreichischen Staatsbahnen, Berlin N W 7, Unter den Linden 47.

Tiu ĉi malgranda gvidlibro enkondukas nin en la ĉarman aŭstrian landon. Ĝi estas tre valora dum la somera vojaĝtempo, precipe tial, ĉar ĝi entenas multajn klarajn bildojn; per tio oni gajnas ĉarmplenan aspekton de tiu montara lando tiel, ke oni deziras konatiĝi kun ĝi persone. La Esperanta stilo estas tre klara kaj facilkomprenebla, sed kial Tirolio, Salcburgio, Bohemio kaj Karintio? Sufiĉas Tirol, Salcburgo, Bohemio kaj Karinto, la enŝovita „i“ estas tute superflua. Estas dezirinde, ke multaj esperantistoj venigu senpage tiun ĉi gvidlibron de la supre montrita oficejo, por montri la komunan intereson pri la bela aŭstria lando, kiu estas ilustrita en belega maniero per la manportuna poŝgvidlibreto. La esperantistaro ŝuldas grandan dankon al la aŭstria ministerio por fervojaj aferoj, ke ĝi akceptis nian lingvon por komuna interkompreniĝo; vere ĝi montras la vojon al la aliandaj administracioj, agi sammaniere kaj ankaŭ uzi Esperanton.

Tacitulo

Diversaj eldonaĵoj

Leterpapero

Paperujoj kun leterpapero, eldonitaj de Albert Kaiser's Buchhandlung, Burgstr. 3, Schweidnitz (Germ.). Pr: 0.35 M. (0.175 Sm.) por ĉiu koverto afrankite.

La elegantaj paperujoj montras ekstere, en verda preso, reliefan stelon, la vorton „Esperanto“ kaj la devizon „Ni laboru kaj esperu“. Ili enhavo konsistas aŭ el 5 leterfolioj kun kovertoj, aŭ el 5 leterkartoj kun kovertoj, ĉiuj el bonkvalita tolsimila papero kaj surhavantaj simplan, reliefe presitan verdan stelon. La formato de ĉiuj kovertoj estas 13¹/₂×9 cm. La paperujoj estas tre rekomendindaj al amantoj de luksa leterpapero.

Poŝtkartoj

Parizo kaj ĉirkaŭaĵo — Kelkaj albumoj de 24 ilustritaj poŝtkartoj pri Parizo kaj diversaj vizitindaj monumentoj kaj pejzaĝoj. Eldonitaj por la ekskursoj de la Deka Kongreso de Ch. Verax, scienca fotografisto, 35 B-d Arago, Paris. Pr: po 0.450 Sm. por ĉiu albumo. (Vidu la artikoleton „Por la kongresanoj de la Deka“ en la rubriko „Tra Esperantujo.“)

Esperanto-monumento en Franzensbad — 3 kartoj montrantaj la ĵus inaŭguritan monumenton kaj ĝian iniciatoron. Haveblaj ĉe S-ro Jakob Hechtl, fervoja sekretario, Hotel Biedermaier, Franzensbad (Bohemujo, Aŭstrio). Prezo ne montrita.

Hamburg — Nova serio de 5 multkoloraj kartoj kun Hamburgaj vidaĵoj kaj kun germana kaj Esperanta tekstoj. Havebla ĉe S-ro Paŭlo Balkányi, Rentzelstr. 7, Hamburg 13. Pr: 0.250 Sm. (ĉiu ekz. 0.050 Sm.) afrankite.

La kartoj estas vere belegaj kaj tre rekomendindaj al esperantistoj vizitantaj la malnovan, faman havenurbon.

Budapest — Serio de 12 multkoloraj kartoj kun Budapestaj vidaĵoj kaj kun hungara kaj Esperanta tekstoj. Havebla ĉe S-ro Ludoviko Kókai, Károly-utca 1, Budapest IV (Hungarujo). Prezo ne montrita.

Ĉi tiuj kartoj estas same belaj kiel tiuj de Hamburg. Ili montras la plej rimarkindajn vidindaĵojn de la hungara ĉefurbo. Forsenditaj, tiaj poŝtkartoj estas taŭga propagandilo por Esperanto.

Bozen-Gries — 6 unukoloraj kartoj kun ilustraĵoj el la konata tirola banloko kaj kun Esperantaj tekstoj. Haveblaj ĉe S-ro Wilhelm Wittek, St. Johann 515 I, Villa Engel, Bozen (Tirolo, Aŭstrio). Pr: po 0.050 Sm.

Ankaŭ ĉi tiuj poŝtkartoj, kiuj montras vidaĵojn el Bozen kaj ĉirkaŭaĵo, estas bonaj por la propagando, ĉar ili apud la klariga teksto en nia lingvo surhavas stelon kun la vorto „Esperanto“.

La Espero — Himno Esperantista de D-ro Zamenhof kun kantnotoj sur poŝtkarto. Havebla ĉe S-ro Ludoviko Kókai, Károly-utca 1, Budapest IV (Hungarujo). Pr: 0.040 Sm.

Estis bona ideo, represi nian himnon sur poŝtkarton; tiamaniere oni povas ĝin facile dissendi kaj oportune porti en la poŝleterujo.

Sigelmorkoj

Reklamomarko de la „Bugra“ — La direkcio de la Internacia Ekspozicio de Librometio kaj Grafikaj Artoj eldonis sian oficialan reklamomarkon ankaŭ kun Esperanta teksto. Estas presitaj 250 000 ekzempleroj, kiuj en kvantoj de po 20 por 0,10 M estas dissendataj ĉien. Ciu esperantisto postulu la belajn markojn kaj montru per tio al la ekspozicia direkcio la disvastiĝon de Esperanto. Ju pli da markoj oni postulas, des pli bone estas. Plej dezirinde eĉ estus, se la markoj baldaŭ elĉerpiĝus tiel, ke la direkcio devus presigi novan eldonon. Oni mendu la markojn ĉe S-ro *Museumsdirektor Dr. Schramm*, Bugra, Abteilung Esperanto, Leipzig.

Esperanto-domo en la „Bugra“ — Reklamomarko eldonita de Germana Esperanto-Librejo, Johannsplatz 3, Leipzig. Formato rektangula, 40 × 62 mm. Havebla ĉe la dirita librejo, kiu havas vendejon ankaŭ en la Esperanto-domo. Pr: 50 ekz. 0.40 M (0.200 Sm.) 100 ekz. 0.60 M (0.300 Sm.)

La supra triono de la marko montras la flave presitan domon sur blua fundo, kaj la ceterajn du trionojn plenigas la nigre presita kaj same enkadrigita plena nomo de la ekspozicio en Esperanto kaj la eldoninta firmo. La marko estas tre efika.

Xa Universala Kongreso de Esperanto — Bela kolekto de 25 malsamaj markoj, oficiale eldonitaj de Esperantista Federacio de Centrokcidenta Franclando, okaze de postkongresa ekskurso al kasteloj de Loire (11 Aŭg. 1914). La markoj estas haveblaj ĉe S-ro Chaussard, 127 bis, Faubourg Bonnier, Orleans (Francujo). Pr: 1 kolekto 0.200 Sm., 4 kolektoj 0.600 Sm., 20 kolektoj 2.400 Sm. afrankite kontraŭ antaŭpago (konto ĉe Ĉekbanko Esperantista).

La formato de la markoj estas rektangula, 63 × 50 mm. Sur blanka, blue enkadrigita fundo la markoj montras fotografajsimilajn vidaĵojn de la famaj

kasteloj apud Loire. La vidaĵojn ĉirkaŭas teksto. La belaj markoj estas speciale rekomendindaj al kongresanoj, kiuj partoprenos la diritan ekskurson. Sed ankaŭ por kolektantoj ili estas valoraj.

Deutscher Esperanto-Bund Ortsgruppe Danzig — 2 propagandaj markoj eldonitaj de la dirita grupo. Form.: rektangula, 44 × 65 mm. Haveblaj ĉe la oficejo de la grupo, Kaninchenberg 14, Danzig (Germ.). Pr: po 1 respondkupono por 10 ekzempleroj.

La markoj estas faritaj el blua papero. Unu el ili montras sur nigra, verde enkadrigita fundo la urbdomon de Danzig, plue Esperantan stelon kaj la nomon de la grupo verde presitaj. Supre kaj malsupre staras ankaŭ teksto. Ĉi tiu speco estas vere bela kaj efikoplena. — La alia speco estas pli simpla: ĝi surhavas nur verdan stelon kaj la supre cititan plenan nomon de la grupo kun la adreso de la oficejo. — La unuan specon la Danziganoj intencas uzi por korespondadoj al eksterurbanoj kaj la duan por lokaj skribaĵoj.

Bromberg — Propagandaj markoj eldonitaj de la katolika grupo en Bromberg. Form.: rektangula, 44 × 64 mm. Haveblaj ĉe F-ino Bogustawska, Parkstr.13, Bromberg (Germ.). Pr: 1 folio = 16 ekzempleroj 0.20 M (0.100 Sm.), 5 folioj 1 M. (0.500 Sm.)

La markoj, kiuj tre similas la supre preparolitan unuan specon de Danzig, aperis sur kvin diversaj paperkoloroj. Ili montras, sur nigra fundo, katolikan preĝejon de Bromberg. Supre, sur verda fundo, la vortoj „Antaŭen kun kredo“, malsupre, ankaŭ sur verda fundo, „Bromberg Bydgoszcz“, la blazono de la urbo kaj verda stelo. Tre rekomendindaj markoj por la propagando en katolikaj rondoj.

La grupo, aŭ pli ĝuste S-ro preposto Becker eldonis ankaŭ rondan propagandan markon (diametro 35 mm) sur blanka papero kun granda verda stelo, kiu enhavas reliefe presitan blankan „E“. Ankaŭ ĉi tiu marko estas havebla ĉe F-ino Bogustawska. Pr: 100 ekz. 0.30 M. (0.150 Sm.)

10 Ansichten aus den Dolomiten — Serio de belaj multkoloraj markoj, montrantaj 10 diversajn vidaĵojn el la dirita montaro. Eldonita de Societo Esperanto, Bozen-Gries. Form.: rektangula, 54 × 40 mm. Havebla ĉe S-ro Wilhelm Wittek, St. Johann 515 I, Villa Engl, Bozen (Tirolo, Aŭstrio). Pr: 1 serio 0.150 Sm.

Estas bedaŭrinde, ke tiuj ĉi belegaj markoj surhavas nur germanan tekston kaj ne ankaŭ Esperantan. Tamen ili atentigas pri Esperanto per stelo kaj per la nomo de la eldoninta grupo. Ili meritas grandan disvastiĝon.

Propagando-markoj eldonitaj de Moraviaj Esperanto-Pioniroj; haveblaj ĉe S-ro *Jar. Mastný*, juristo, en Olomouc, germ. Olmütz (Moravio, Aŭstrio), [Kontulo de Ĉekbanko Esp. No. 724] — Pr: 100 ekz-oj 0.350 Sm., 500 ekz-oj 1.400 Sm.

La unukoloraj markoj estas grandaj 6 × 4 cm, kaj montras reliefe presitan eldiron de J. A. Comenius en Esperanto. Ili aperis en blua, malhelverda kaj griza koloroj. La preso sur ĉiuj estas blanka.

Esperantaj glumarkoj, 120 – 150 diversspecaj ekzempleroj miksitaj por 53 hel. = 0.225 Sm. — Haveblaj ĉe la Oficejo de Bohema Unio Esperantista, Dittrichova ul. 7, Praha II (Bohemujo).

Reklamomarko de la Esperanta Librejo Ludoviko Kókai, Károly-utca 1, Budapest IV. 2½ × 1½ cm, verda-blanka. Pr: 100 ekz. 1.20 Kr.

≡ Por lertuloj ≡

Enigmoj kaj problemoj

No. 16

Ĉevalira problemo

o	ho	pe	lin	per	ka	pa	ni	da
ran	en	ĉi	kres	Es	a	gran	ana	l'
mond'	en	gvo	su	du	ce	de	rond'	font'
ĉio	to	la				la	ma	ro
la	Ni	per				kaj	ĉefa	mi
su	gvo	ran				ĝu	mal	kom
pe	mond'	a				preno	fer	la
lin	to	Es				pac'	per	de

Tele

No. 17

Litera enigmo

a
a i i
l l p p p
r r s
s

Ordigu la literojn tiel, ke la horizontalaj kaj vertikaj vicoj montru la samajn vortojn (radikojn), nome: 1. literon, 2. econ, 3. urbon, 4. muzikilon, 5. literon.

Arĥimedes

No. 18

Mi estas lumo; sed mi donas ombbron,
Se du literojn interŝanĝos vi.

Arntz

En la venonta numero de eldono B ni publikigos la solvojn de la ĉi-supraj problemoj. La divenintoj bonvolu sendi la solvojn, skribitajn nur sur poŝtkarto sen iu alia komuniko, ĝis la 5a de l' venonta monato al nia redaktoro, Friedrich Ellersiek, Wissmannstr. 46, Berlin S. 59. — Tri el la solvintoj ricevos libropremion, kiun ili povos elekti el la katalogo de nia eldonejo. (Valoro de ĉiu premio ĝis 1 Sm.).

La gajnintoj bonvolu sciigi al nia eldonejo, Ader & Borel G. m. b. H., Dresden-A. 1, Struvestr. 40, la librojn, de ili deziratajn.

Solvoj el la antaŭa numero

No. 13

Stratford, Hamlet' april' klasika, elegi'
sonet' poet', epilog' aŭtor' romantik' epos'

Shakespeare

No. 14

Palat', erinac', numid', tort', eŝafod',
kuf', orgen', sonet', tulip', oksigen'

Pentekosto

No. 15

malarmo — alarmo

Gustajn solvojn sendis:

1) de ĉiuj numeroj: Wilhelm Daum, B.; Else Große, juĝejkonsilista edzino, W.; Th. Kempe, R.; F-ino Margarete Lachmund, L.; E. Momber, H.; Arthur Ohl, M.; Joseph Sommer, L.; E. Ulitzsch, G.

2) de du numeroj: Ad. Appelt, G. (Bohemujo); Johannes Bauer, G.; Kurt Böhme, D.; G. Brucks, cand. math., B.; Richard Brüggemann, B.; Max Butin, T.; F-ino Elisabeth Höppner, D.; W. Knopf, supera instruisto, B.; F-ino Mathilde Jaquel, M.; Prof. Dro Schmidt, W.; Reinhard Schmidt, referendario, B.; E. Schrape, imp. sup. limdepagrevizoro, M.; Ziemann, juĝsekr., G.

3) de unu numero: V. Didrihson, O. (Rusujo); M. Jahrstorfer, studento, R.; R. Laval, A. (Francujo); A. Tietze, F. (Bohemujo).

La premiojn gajnis per loto: S-ino Else Große el W., S-ro Th. Kempe el R. kaj S-ro E. Ulitzsch el G.

≡ Redakcia korespondo ≡

Arĥimedes — Dankon pro la senditaj enigmoj. Unu el ili ni uzis por tiu ĉi numero, kaj el la ceteraj ni publikigos ankoraŭ numerojn 2 kaj 6.

S-ro J. B. — Vi estas prava: en la bibliografia parto de la antaŭa numero okazis bedaŭrinda intermikso de tekstoj, kiun la presisto faris ĉe la enpaĝigo de la kompostajoj. Bonvolu atenti la korekton en ĉi tiu numero kaj pardoni la eraron, pri kiu ni ne estas kulpaj.

Germanaj samideanoj! Postulu de la firmo Ader & Borel, Dresden, la germanlingvan prospekton pri nia karavano al Paris kaj propagandu por la vojaĝo inter neesperantistoj!